

LA JUNA VIVO

MONATA GAZETO DE „TUTMUNDA ESPERANTO-JUNULAR-ORGANIZO“

Redakcio: S-ino E. Burgler, Geleen, Markt 64, Nederlando

Administracio: S-ro G. de Vries, R.P.I. Pav. AB, Bosdijk 771, Eindhoven, Nederlando

Ĝiro Nro 537168

Jarabono 3 ned. guld. aŭ egalvaloro

MIAJ NIGRULAJ AMIKOJ.

En Usono (USA) vivas aktuale ĉirkaŭ 13 milionoj da nigruloj. La plej granda parto el ili troviĝas en la sudaj ŝtatoj (Missisipi, Alabama, Georgia), kie ili antaŭ la granda civita milito (1861-65) laboris kiel sklavo en blankulaj plantaĝoj. Post tiu milito, en kiu la nordaj ŝtatoj venkis super la sudaj, ĉiuj sklavo estis liberigitaj. Sed samtempe komencis epoko de senĉesaj malamikecoj kaj sociaj maljustaĵoj inter blankuloj kaj nigruloj, kiu ankoraŭ hodiaŭ daŭras.

Tiujn suprajn faktojn mi konis, kiam mi alvenis en Usono. Plie, mi estis aŭdinta onidirojn pri leĝoj, kiuj separigas blankulojn kaj nigrulojn en lernejoj, restoracioj, teatroj kaj tramoj; pri ekonomia mallibereco kaj mizero de ĉiuj sudŝtataj nigruloj, pri la malbonfama „Klu-Klux-Klan“ sekreta societo kiu, ankoraŭ hodiaŭ ekzistanta, terorigus nigrulojn se ili ne sklave obeus al siaj mastroj. Mi ne emis kredi tiujn onidirojn, ĉar ili ŝajnis strikte kontraŭaj al la principoj de Usona demokratio. Tial mi de-

ziris, paroli kaj demandi nigrulojn mem.

Baldaŭ mi havis la okazon por tio. En oktobro 1952 ni - grupo de 6 junaj Germanoj - povis viziti la faman Bethune-Cookman-College (nigrula universitato) en Deytona Beach, Fla, U.S.A. Alvenante, ni estis tre elkore akceptitaj per kvinpersona grupo: la prezidanto mem kaj kvar studentoj, kaj ni komencis rondiron tra la universitata kampo. Kvankam, teorie, lernejoj instalaĵoj por blankuloj kaj nigruloj estu samvaloraj, baldaŭ evidentiĝis ke tiu ĉi lernejo estis malpli bone ekipita ol normala blankula lernejo. Tamen ili kun fiero montris al ni la antaŭ nelonge inaŭguritan malgrandan bibliotekon, kaj la sporthalon, kiu estis aktuala en konstruo. Kun emociiga lingvo ili rakontis la historion de ĉiu unuopa el la konstruaĵoj, kvazaŭ ili amus ilin. Mi havis la impreson, ke certe nenion ili ricevis donace. En la diversaj klasoj, kiujn ni vizitis, ni trovis la nigrulajn gelernantojn tre fervore lernantaj kaj multe pli streĉe aŭskultantaj la

(daŭrigo sur la 2a kaj 3a paĝoj)

PARENTEZE.

Timo.

*Hura, fine ni havas niajn servojn!!
Sendube ĉi tio signifas multajn
paŝojn en bonan direkton. Ke la In-
forma Fako baldaŭ sekvu!*

*Por mi mem speciale la Vojaĝ-
servo povos esti karesinda trezoro;
vi sciu ke mi estas eksterordinare
vojaĝema - prapatro mia laŭ obsti-
naj flustroj malkovris malproksiman
insulon - kaj ke mi preskaŭ ĉiun
nokton songas pri ekscitigaj vagadoj
tra sovaĝaj arbaroj en nekonataj
landoj.*

*Ĉu tial estas mirinde ke mi kiam
mi estis leginta la bonan novaĵon tuj
fosis fervore en ĉiuj miaj ŝrankoj
por kolekti prospektojn pri fremdaj
landoj kaj helpeme sendis ilin al nia
vojaĝservulo? Kaj ke mi samtempe
sciigis al li mian nomon kaj adreson
kiel gastiganton kaj petis kiel eble*

*plej baldaŭ la adresojn de ĉiuj aliaj
gastigantoj en la tuta mondo?*

*Mi nun febre projektas gigantan
mondvojaĝon; jam aĉetis mapojn
ktp. kaj petis informojn de la V.S.
pri vizoj por Kaniballando, vojaĝ-
eblecoj kaj kurzoj.*

*Tamen mi havas timon, kiu ne
forlasas min eĉ dum momento; ho,
ne ke mi estos mangata de indiĝenoj,
sed ke - ankaŭ vi ĉiuj, karaj gegas-
tigantoj, projektas tiajn grandajn
vojaĝojn! Kiom da laboro nia ŝatata
asesoro vojaĝserva, - ah,
kompatindulo li fariĝos, -
havos, kaj ... kie mi povos
gastloĝi se vi ĉiuj vojaĝa-
dos??*

*Sekurece mi ankaŭ kun-
portos tendon!*



(daŭrigo de la 1a paĝo)

instruistojn ol ordinaraĵ blankulaj
gelnantoj. Tiu impresado de lernege-
mo de la nigruloj ripetigis je ĉiu oka-
zo. Je la dekunua horo nia grupo
eniris la aŭlon, kiu estis jam pleni-
ĝinta per gestudentoj: honorante
nian viziton, la prezidanto estis kun-
vokinta specialan kunvenon. Ni sidi-
ĝis sur platformo kaj la voĉbruo tuj
silentiĝis. Post komuna preĝo, ek-
sonis elkor-freŝa kanto, kies reĝan-
taĵo estis: „Ameriko, mia patrujo”.
En tiuj minutoj, mi juĝis tiun kan-
tadon certe la plej bela iam aŭdita:
tiom klara, bela, forta, elanima kaj
aminda!

Nun la prezidanto faris parolade-
ton kaj prezentis ĉiun el ni. Poste ĉiu
el ni diris kelkajn frazojn pri tio
kion ni sentis. Post la kunveno, longa

vico da studentoj formiĝis al la plat-
formo: ĉiuj silente premis nian ma-
non.

Neniam antaŭe mi sentis tiom la
simbolecon de la manpremo. Ĉi tie
ĝi esprimis pli ol vortoj povas diri.
Mi forte sentis, kion ĝi signifis:
„Dankon al vi pro via vizito sen-
respekte al nia socia apudŝoviĝo. Di-
ru al la homaro, ke ankaŭ ni sopiras
esti parto de la homaro, ke ni arde
deziras lerni, labori kaj vivi!” - Kiam
tiu manpremado estis finita kaj ni
eliris la halon, mi estis tre emociigita.

Alfonso estis mia nigrula tablo-
najbaro dum la posta komuna tag-
manĝo. Ni parolis pri la socia situo
de la nigrularo. Li diris: „La blan-
kuloj argumentas, ke ni ne povas
eniri iliajn profesiojn ĉar ni ne estas

LERNEJOJ KAJ LERNEJTEMOJ.

Diversfoje montriĝas ke ekzistas grandaj diferencoj inter la edukaj sistemoj de diversaj landoj, kiel ankaŭ inter la diversaj filozofioj kiuj fundamentas tiujn sistemojn. Pro tio ke la TEJO estas interesata de la lerneĵproblemo, mi opinias ke interesus la anojn legi pri la du ĉefaj instrusistemoj, kaj ankaŭ pri la temo „Esperanto en la lernejoj”.

En Sudameriko, kaj multaj partoj de Eŭropo, la filozofio baziĝas sur la celo: instrui kiel eble plej multe pri kiel eble plej multaj temoj. En aliaj landoj, precipe Usono, la filozofio baziĝas sur la celo: instrui kiel eble plej multon pri nur kelkaj temoj. Laŭsupoze neniu el tiuj du sistemoj estas bona, sed en la praktiko oni akiras bonajn rezultojn.

Ĉar mi supozas ke la mult-tema instruado estas pli-malpli konata de la legantoj, mi deziras iom detalete priskribi la usonan sistemon, samtempe komparante ĝin kun la alia sistemo.

En la elementa lernejo oni kutime instruas nur tre malformale, ofte la sama instruisto instruas pri ĉiuj temoj, celante doni bonan ĝeneralan informon. Pro tio ke neniu infano forlasas la lernejon ne vizitinte la gimnazion, oni povas bone doni tian bazon. La instruisto, konstatante la bezonojn kaj kapablojn de la lernantoj, povas variigi la instruadon. Oni

ne kutimas instrui detale iun temon, do ankaŭ lingvoj, kiuj postulas konstantan praktikadon, ne inkluziviĝas en la temaro.

Subita ŝanĝo okazas en la gimnazio. La gimnazio estas por multaj personoj la lasta lernejo vizitata, do bona kaj iom detala instruado estas nepre necesa. Nun evidentiĝas gravaj diferencoj inter la instrumentadoj. Oni devas decidi ĉu instrui iometon pri multaj temoj, aŭ multon pri kelkaj temoj. En usonaj gimnazioj oni kutimas uzi la duan metodon, kaj instrui nur kvar-kvin temojn dum la jaro al ĉiu lernanto. En multaj sudamerikaj kaj alilandaj lernejoj oni instruas pli multajn temojn, eĉ ĝis dek aŭ dek du, sed kompreneble la daŭro de la lecionoj estas malpli longa.

Detaloj diferencas laŭ la regiono, kompreneble, do por prezenti la usonan sistemon, permesu al mi min limigi al tiu sistemo uzata en New York, la plej granda ŝtato rilate al nombro de loĝantoj, komprenigante ke la saman metodon uzas pli-malpli simile ankaŭ la aliaj ŝtatoj.

La infano komencas sian studadon dum sia kvina aŭ sesa jaro. La elementa lernado daŭras dum sep aŭ ok jaroj, kaj la gimnazia lernado daŭras tiom da tempo ĝis dekdu jaroj da instruado finiĝis, do en la gimnazio estas kvar aŭ kvin jaroj laŭ la bezonoj. Infano estas kutime deksep-

sufiĉe edukitaj. Sed bedaŭrinde ili ne donas al ni egalan eblecon por lerni”. Li pravis. Sed samtempe la sudaj ŝtatoj havas grandegajn ekonomiajn malfacilaĵojn, pretigantaj kompletajn lernejojn por nigruloj. Tial ili povas konstrui tiujn lernejojn nur malrapide, iom post iom.

Kun bonvolo de ambaŭ partoj - kaj mi certas, ke la nigrularo jam havas tiun - la problemo povos esti solvata.

Mi estas fiera pro miaj nigrulaj amikoj.

Michel Schmidt.

aŭ dekok-jara finante sian gimnazian kursaron, sed ofte pli juna, ĉar en la elementa lernejo oni rajtas mallongigi ies studadon se la infano montriĝas tre lerta.

En la gimnazio estas kutime ses horoj da studado ĉiutage dum kvin tagoj de la semajno (mankas sabato kaj dimanĉo). Por diplomiĝi la infano devas esti sukcese studinta dek ses kursojn, do kvar ĉiujare. Dum la aliaj du horoj la infano studas laŭvolajn kursojn, aŭ havas liberan studhoron, en aparta ĉambro uzata por tiu celo. Ankaŭ la gimnastika kurso, deviga trifoje dum la semajno, devas okazi dum tiuj du liberaj horoj.

Por diplomiĝi oni devas sukcesi pri certaj kursoj, ekzemple kvar kursoj pri angla lingvo (unu ĉiujare), kursoj pri monda kaj usona historioj, kursoj pri matematiko. Kursoj pri lingvoj estas devigaj nur por tiuj kiuj intencas eniri universitaton kiu necesigas tion. La kutimaj lingvoj lerneblaj estas franca, hispana, latina, germana, foje la itala. Ofte oni ankaŭ instruas mekanikon, por tiuj kiuj tion deziras. Almenaŭ du sciencajn kursojn (unu ĝeneralan kaj unu precipan) devas ĉiu studi.

Finaj ekzamenoj por abiturientiĝi ne okazas, nur sukceso en la individuaj kursoj estas necesa.

Kurso estas aranĝata tiel: klasoj kvinfoje dum la semajno, po unu horo. La instruisto ricevas de la instruistaro foliaron kun informo pri la minimumaj punktoj instruotaj. Estas la devo de la instruisto instrui tiujn punktojn dum la jaro, kaj aldoni al ili aliajn aferojn kiujn li opinias bonaj. La instruisto ankaŭ decidas por si mem kiom da emfazo kaj tempo ricevos ĉiu punkto. Dum la jaro oni donas ekzamenojn, faritajn de la instruisto, kaj je la jarfino oni

donas ŝtatan ekzamenon faritan de la estraro kiu preparis la minimuman punktaron supre menciitan.

La ŝtataj kursplanoj tamen estas por personoj kiuj eniros universitaton, kaj estas faritaj por taŭgi por tia eniro. Multaj studentoj, tamen, ne estas kapablaj eniri universitaton, pro manko de inteligento aŭ lerteco. Por tiuj ekzistas paralelaj kursoj pri la samaj temoj, sed preparitaj de la lernejo mem, kaj oni instruas tiujn temojn kiujn plej bezonas la apartaj klasoj. Tamen, ĉiu kiu kapablas lerni la ŝtatan kurson faras tion.


Komprenoble multaj personoj volas kursojn kiujn ne planas la ŝtato. La ŝtato preparas kursojn nur pri tiuj temoj kiuj estas tre popularaj. Pro tio, se grupo de studentoj volas kurson kiun ne preparis la ŝtato, la lernejestraro, aŭ, pli kutime, la individua temdepartemento, preparas la kurson. Tio ofte okazas rilate al superaj lingvo-kursoj, superaj matematik-kursoj, ktp. La kursoj preparitaj de la lernejo individua estas egale aŭtoritataj kiel tiuj de la ŝtato, kaj por ili oni ne bezonas specialan permeson.

En tiun sistemon, do, facile estus meti Esperanton, se oni volus ĝin. Ke tio ne okazas estas rezulto de sendeziro de la lernantoj kaj instruistoj kaj la publiko mem.

Ekzemplaj kursoj estas: angla lingvo, fremdlingvoj, algebro elementa kaj progresiva, geometrio elementa kaj progresiva, historio, psikologio, por knabinoj, foje kuirado, tajpado, stenografio, foje ankaŭ aŭtomobilkonduko.

La dua metodo estas tute alispeca. Tiu metodo, ne konata en Usono, konsistas el pli multaj kursoj, kun pli malmulta tempo por ĉiu. Laŭ tiu metodo oni lernas unu temon dum

(daŭrigo sur la 6a paĝo)



9^a kongreso en Wörgl

LA OFICIALAJ INFORMOJ PRI NIA 9-a I.J.K. EN WÖRGL

3-10 aŭg. 1953a.

LA OFICIALA PROGRAMO.

Finfine ni kapablas doni al vi la allogan, varian kaj ĝuindan programon de nia 9-a kongreso:

- Lunde 3-8-'53:** Alveno, akcepto, ordigo de la kongreskotizo kaj kongres-paperoj, indikado de loĝejoj.
18.30 h.: Komuna vespermangado.
20.30 h.: Interkona vespero.
- Marde 4-8-'53:**
8.30 h.: Florkronmetado kaj fotografado antaŭ la Zamenhof-monumento.
9.30 h.: Oficiala Kongresmalfermo.
14.00 h.: Banekskurso al ŝlimbordbanejo en Kirchbichl.
20.00 h.: Koloraj lumbildoj pri Kaiser-montaro.
- Merkrede 5-8-'53:** Jarkunveno (tuttaga)
vespere: Tirola vespero.
- Jaŭde 6-8-'53:** Tuttaga ekskurso. Laŭplaĉe al:
a. Vorderkaiserfelden.
b. Kaiserlifto.
vespere: Internacia festvespero.
- Vendrede 7-8-'53:** Tuttaga ekskurso al Innsbruck (al sur Hafelekar per pendfervojo)
vespere: Libera.
- Sabate 8-8-'53:** Parolad-konkursoj k.s. (aranĝota de TEJO-estraro)
vespere: Internacia balo.
- Dimanĉe 9-8-'53:**
matene: Diservo. Oficiala kongresfermo.
posttagmeze: Ekskurso al Hechtsee ĉe Kufstein; Adiaŭa kunesto.
- Lunde 10-8-'53:** Forveturo de la gekongresanoj, kiuj ne intencas resti ankoraŭ kelkan tempon en Wörgl.

Kompreneble diversaj programeroj dependas de la veteraj cirkonstancoj, pro kio do ŝanĝoj estu rezervataj.

La loĝado ĉijare devas esti iom alie aranĝata ol ni kutimas fari. Ĝis nun ni ĉiam disponis pri unu aŭ pluraj grandaj ejoj, en kiuj ĉiuj partoprenantoj povis trovi lokon. En Wörgl tiu ebleco ne ekzistas, pro kio la pp.

devos loĝi en gastejoj, privataj ĉambroj kaj en tendaro, por kiu lasta ni povas disponi pri tereno en la mezo de la urbo. La tendemuloj mem kunportu siajn tendojn: pajlo estos senkoste havebla.

KONGRESKOTIZO.

Aliĝante al la kongreso vi samtempe pagu vian kongreskotizon al via landa peranto, kaj se li ne ekzistas rekte al S-ro Hans Steiner, poŝtĉekkonto: 194.436, Wörgl. La anoj en Aŭstrujo ankaŭ rekte pagu al S-ro Steiner. La membroj en Nederlando bv. pagi al S-ro G. de Vries, Pav. AB, Bosdijk 771, Eindhoven, ĝiro: 537168.

La kongreskotizo por TEJO-anoj ĝis 30 j. estas 20 aŭstriaĵ ŝilingoj (g. 3,25). Por anoj pli ol 30 j. kaj ne TEJO-anoj ĝi estas 25 aŭstr. ŝilingoj (g. 4.—).

La landaj perantoj kunportos la monon al Wörgl kaj se ili ne partoprenas, ili sendas la tutan ricevitan sumon al sro H. Steiner.

Restadkosto:

Sekvas jen la restadkosto, kiujn oni - kompreneble - pagos en Wörgl:

1 matenmanĝo	4-8 aŭstr. ŝilingoj
1 tagmanĝo	10-12 aŭstr. ŝilingoj
1 vespermanĝo	10-12 aŭstr. ŝilingoj
1 tranoktado en gastejo aŭ priv. ĉambro	15-22 aŭstr. ŝilingoj

1 taga pensio 45 ŝilingoj aŭstr.

La ekskursoj entute sumiĝas je 100 aŭstr. ŝilingoj. En Wörgl vi mem povas decidi, kiujn el ili vi volas partopreni.

Ĉiuj prezoj rilatas nur unu personon.

N.B. Kurzoj:

1 ned. guld.	= ± 6 aŭstr. ŝil.
1 brita ŝil.	= ± 12 aŭstr. ŝil.

Ni konsilas al vi kiel eble plej baldaŭ aliĝi, por ke vi estu certa pri la plenumiĝo de viaj deziroj.

Aliĝiloj povas esti akceptataj ĝis la 1a de julio.

Ĉiujn informojn volonte donas la L.O.K. al kiu vi sendu ankaŭ vian aliĝilon. Adr.: sro H. Steiner, Augasse 42, Wörgl, Tirol, Aŭstrujo.

Petante informojn ĉiam aldonu unu internacian respondkuponon ĝustmaniere stampitan.

Kiu gvidos karavanon al Wörgl? En Anglujo estas interesiĝo. Kontaktu kun fino Rees.

(daŭrigo de la 4a paĝo)

nur du aŭ tri tagoj de la semajno, alternante ĝin per alia temo same ofte lernata. Tiu sistemo estas simila al la universitata sistemo, sed supozigas ke la infano estas kapabla serioze studi temojn sen multa ekstera helpo. Ĝi estas ankaŭ iom nepraktika,

ĉar por utiligi la temojn lernitajn la studento devas studi multe post la gimnazio.

En dua artikolo mi volas diskuti la valoron de la sistemoj, kaj la rolon de konstruita lingvo en ambaŭ.

Donald R. Broadribb.

LA MIRAKLO DE WÖRGL 1932.

Wörgl - estas urbo, kiu dum ĉi tiu jaro havas specialan intereson por ni TEJO-anoj. En la januara numero de „La Juna Vivo” ni legis mallonge, ke oni tie foje faris monan eksperimenton, kiu mondkonatigis la urbon. Certe multaj el ni deziras sciigi pli multe pri tiu afero kaj tial mi volas detale priskribi la okazaĵon.

Kio okazis? Dum 1932 regis gravega ekonomia krizo en la mondo kaj ankaŭ tie. La 1500 laboristoj de la urbo estis preskaŭ ĉiuj senlaboraj. La komunumo ne plu povis pagi la altajn elspezojn por subvencioj. La komunuman kason premis rentumaj ŝarĝoj, ne-pagitaj impostoj kaj ŝuldoj. Estis granda mizero kaj neniu helpo videbla.

La urbestro havis planon kaj ankaŭ la kuraĝon por iri novan vojon. Li sciis, ke la mono estas la sango de la ekonomio kaj konstante devas cirkuladi, se oni volas eviti krizon. Tion li estis sciiginta studinte la libron de Silvio Gesell „La natura ekonomia ordo”. Li sukcesis konvinkigi ankaŭ la aliajn urbestranojn kaj riskis la eksperimenton. Li eldonis en sia komunumo monon kun deviga cirkulado, kion oni nomis biletoj pri laborvaloro. La cirkuladon de ĉi tiu provizora mono oni sekurigis per tio, ke ĉiam la respektiva posedanto de monbileto unufoje monate je certa tago devis pagi 1 % da imposto por la bileto. La impostomarko estis gluenda sur la bileton.

Tio sufiĉis por rapide cirkuligi la monon, ĉar ja ĉiu volis lasi la impostopagon al la sekvantulo.

La efekto estis miregiga. Malgraŭ ke la kvanto de la eldonita mono estis relative malgranda, ĝi tamen efikis kiel granda kvanto kaŭze de la ĉiutaga debito de la monbiletoj.

Monbileto de 10 ŝilingoj kiu ĉiutage unufoje estas elspezita, debitas por 300 ŝ. varojn dum la monato kaj tiuj varoj devas esti nove produktataj. Tiel oni rapide vivigis la ekonomion. La nombro de la senlaboruloj malaltiĝis, ŝuldojn kaj impostojn oni pagis, kaj al la komunumo estis eble fari konstruajn laborojn. Iun straton oni kanalizis, alian oni pavimis, skisaltejon oni konstruis.

La salajrojn oni pagis per la provizora mono, kiun ĉiu volonte prenis, ĉar ĉiu povis aĉeti per ĝi. Sed la mono kun deviga cirkulado havis ankoraŭ alian efekton ol tiun de la beno por la urbo. La miraklo de Wörgl trovis ehon en la tuta mondo. En la urba arkivo de Wörgl troviĝas pli ol mil ĵurnal-raportoj pri tiu afero. Ili povas esti rigardataj de ĉiu eĉ ankoraŭ hodiaŭ. El multaj landoj venis delegacioj por ekzameni la eksperimenton. Inter aliaj vizitis Wörgl-n la Franca eks-ministro Daladier kaj dum publika parolado li rekomendis la imiton de tiu ekzemplo. (Hodiaŭ li ŝajnas esti forgesinta ĉion.) Irving Fisher, la fama ekonomiisto el Usono konvinkigis pri tio, ke por indeksvaluto estas absolute necese havi monon kun deviga cirkulado. Multaj urboj de Aŭstrio volis imiti la ekzemplon de Wörgl. Sed nun iĝis urĝa por la Aŭstria nacia banko realigi interdikton de la „memhelpo Wörgl”, helpe de la registaro.

Kial oni interdiktis la miraklon de Wörgl malgraŭ ĝia sukceso? Oni interdiktis ĝin **pro** ĝia sukceso!

Post ke la eksperimento de Wörgl estis strangulita revenis la mizero. La laboristoj maldungiĝis, la metiistoj ne plu ricevis mendojn kaj la komercistoj restis en plenaj vendejoj.

Ni Esperantistoj ne havas kaŭzon

ORGANIZAJ INFORMOJ.

Sekr-ejo Lombokstr. 2, Leeuwarden (Ned.).

Perantoj.

Kun ĝojo ni sciigas, ke Koos Kranenburg estas preta akcepti la perantecon de la ned. sekcio. Je Pentekosto, dum la landa kunveno la nederlandaj membroj povos voĉdoni pri ĉi tiu estrara kandidatio. Intertempe Koos jam traktas la porkunvenan laboron.

Menciinde estas ke nia franca peranto Daniel Luez kun granda entuziasmo eklaboras por nia komuna afero. Lia poŝtĉekkonto por la Franca sekcio estas: Lille 11 87 38 Daniel Luez Sect.frse TEJO, R. de Laniscourt Laon. (Aisne).

Kunvenoj.

En la semajnfino de la 28a de febr. kaj la de marto kunvenis en Amsterdamo la delegitoj de diversaj junulargrupiĝoj en Nederlando. Krom kelkaj lokaj E-grupoj partoprenis Ju-Ko (junularsekcio de la Asocio de Laboristaj Esperantistoj F.L.E.), SAT-Junulfako (Ned. frakcio) kaj la ned. sekcio de TEJO, kiu lasta estis reprezentita de Koos Kranenburg kaj Tammo Kanter. Priparolataj estis la eblecoj por veni al bazo por intensiva kunlaboro. La rezultatoj estas menciitaj en Finkonkludo, kiu estos metata al la resp. membraroj por voĉdono. Ĝin kaj raporton pri la kunveno vi trovos en la aprila nro de LJV. Al la landa kunveno de la ned. sekcio estas invititaj ankaŭ la membroj de la nomitaj junulargrupiĝoj, tiel ke jam unua kontakto okazu kaj la lastaj paŝoj povu esti farataj por ekfunkciigi la Kunlaborkomitaton definitive. La pentekosta kunveno do fariĝos interesa kaj ni instigas al multnombra partopreno. Detalojn pri la programo vi trovos en bulteno.

Grava sciigo por la TEJO-anoj en Anglujo.

Dum la 34a Brita Kongreso en Bournemouth okazos fakkunveno de T.E.J.O. la 23an de majo, de la 16.30a ĝis la 17.30a horo. Kontakto kun nia peranto.

La taga estraro kaj la redaktorino dankas la membrojn, kiuj sendis signon de kunvivo rilate al la inunda katastrofo, kiu trafis Nederlandon.

MALMULTEKOSTAJ FLUGVOJAĜOJ POR STUDENTOJ.

Skandinava Servo de Studentvojaĝoj, Sct. Pederstræde 19, Kopenhago K. - branĉo de DIS, aranĝos venontsomere multajn flugvojaĝojn. Oni flugos inter Kopenhago kaj jenaj urboj: Parizo, Munkeno, Londono kaj Genevo, krome inter Parizo kaj Barcelono kaj inter Londono kaj Parizo. La biletprezoj estas ege malaltaj - ili kostas la samon kiel 3-a klasa vo-

jaĝo ferveje, ekz. flugvojaĝo inter Kopenhago kaj Parizo kostas 160 d. kr.

Studentoj (eventuale kune kun edzino kaj infanoj) kaj junaj altlernejanoj (studintoj) povos partopreni la flugadon.

Petu detalajn informojn esperante ĉe supre menciita adreso.

silenti kaj tial ni okupu nin pri tiu afero kaj disvastigu la verecon pri Wörgl.

Alfred Neubner.
(mallongigite).

Pliajn informojn pri mono kun deviga cirkulado donas:

Liber-Socia Rondo
Berlin-Lübars
Taubengasse 46
Germanio.



KORESPOND- ADRESOJ

Bulgario: Dez. koresp. k. pers. en Nederl., Francio, Okc. Germ. kaj Svislando: S-ro Nikola At. Kolovski, v. Lehčevo, Mikajlovgr.

Francio: Gimnazianoj (13-16 j.) dez. koresp. kun samaĝuloj. Skribu al Esperanto-lernantinoj, Collège, Laon (Aisne).

Dez. koresp. kun samaĝaj geknaboj: F-ino Nelly Lécolier (14 j.); kaj kun knabo: Marie-Louise Roussel (14 j.). Skribu al Collège, Laon (Aisne).

Nederlando: Ben Brachetti, IJselstraat 16 t, Amsterdam-Z. dez. kor. kun la tuta mondo kaj interŝangi poŝtmarkojn.

Helpu niajn amikojn en la nepagipovaj landoj!

Adresoj, al kiuj regule sendi legitajn L.J.V.-ojn, haveblaj ĉe la sekretario.

INTERNACIA FERIO-SEMAJNO EN KONSTANZ, GERMANUJO.

Por la dua fojo gesamideanoj en Konstanz, Germanujo, invitas la Esperantistaron al Internacia Ferio-Semajno, okazanta de 18-24/7 '53, por ebligi al ĝiaj vizitantoj pluveturi al Zagreb.

Konstanz estas nedetruiita Sudokcidentgermana turisma urbo, kiu gastigis en 1950 la 6an Internacian Junular-Kunvenon de TJO, kaj en 1951 bonsukcesan Internacian Ferio-Semajnon kaj UEA-Postkongreson. Protektanto de la ĉijara Internacia Ferio-Semajno estas la ĉefurbestro de Konstanz, s-ro Franz Knapp. Esperanto-strato estos inaŭgurata dum la ferio-semajno.

La riĉa programo de tiu aranĝo enhavas ekskursojn en la regiono de la

Lago Konstanca (Bodensee), al Aŭstrujo kaj Svislando, prelegojn pri Germanaj pejzaĝoj kaj instruado, viziton al opereto, kaj perfektigan Ĉemetodan Esperanto-kurson kiun donos instruisto Heinrich Müller el Lehrte.

Por ebligi pli bonan kontakton kun la Germana loĝantaro, la partoprenantoj ĉi jare loĝos individue ĉe privataj gastigantoj.

La kostoj por la semajno estas 100,— DM, ĉio enhavita, la aliĝlimo estas la 1/7' 53. Ilustrita invitulo, Esperanto-bildprospekto pri Konstanz kaj ĉiuj informoj estas haveblaj ĉe: „IFS Esperanto, KONSTANZ, Grüngang 8, GERMANUJO”.

JARKUNVENO DE ESPERANTO-FEDERACIO DE DANAJ ALTLERNEJANOJ.

Efda aranĝos jarkunvenon en Kopenhago pentekoste. Komenciĝo: 23-an de majo vesperon. Lasta aranĝo: vizito al Reĝa Teatro 25-an de majo vesperon. Prelegoj pri kulturaj temoj, diskutoj, balo ktp.

Eksterlandaj studentoj kaj altler-

nejanoj povos senpage ricevi kongreskarton, kaj ni povos -se vi frue aliĝos - aranĝi malmultekostan restadon.

Petu senpagan programon de Efda, Laksegade 35, Kopenhago K.



Listo de radiodissendoj en aŭ pri Esperanto. Tempindiko: M.E.T. (= mezeŭropa tempo) valida ankaŭ en Belgujo kaj Nederlando. Mallongigoj: I = informoj. P = parolad(et)o. K = kurso. M = muziko.

MARDE:

- 12.55—13.00 Berno, 31,46 m., 48,66 m.: P de d-ro Arthur Baur.
16.00—16.20 Vieno II, 25 m., 30 m., 41 m., 48 m., 203 m.; P (nur ĉiudua-marde: 27/I, 10/II/1953 k.t.p.).
18.35—18.40 Berno, 31,46 m., 48,66 m.: Ripeto de posttagmeza elsendo).

MERKREDE:

- 16.45—17.00 Graz (Aŭstrujo), 417,2 m.: K.
19.00—19.20 Romo, 25,21 m., 31,35 m., 49,92 m.: P.
20.30—21.00 Madrido (Radio S.E.U.), 42,33 m., 225 m.: P.
22.35—22.40 Vieno I, 25,46 m., 48,74 m., 513 m.: I.
23.15—23.30 Hilversumo I, 402 m., V.A.R.A.: I kaj M.

JAŬDE:

- 08.35—08.40 Rijssel (Lille), 218 m.: I.
09.30—09.45 Parizo, 348 m.: K de P. Delaire.
12.55—13.00 Berno, 31,46 m., 48,66 m.: P de prof. d-ro Edmond Privat pri: „Esperanto-ideologio”.
18.35—18.40 Berno, 31,46 m., 48,66 m.: Ripeto posttagmeza elsendo.

VENDREDE:

- 19.00—19.20 Romo, 25,21 m., 31,35 m., 49,92 m.: P.
23.15—23.30 Hilversumo II, 298 m., 188 m., N.C.R.V.: P pri: „La Evangelio en Esperanto” kaj M (nur 6/II, 6/III, 17/IV, 15/V kaj 12/VI/1953).

SABATE:

- 09.30—10.00 Rio de Janeiro, 30,71 m., 375 m.: K kaj I.
23.15—23.20 Hilversumo II, 298 m., 188 m.: I.

Informoj kaj petoj:

Bonan novan jaron! — Dankante pro la afablaj bondeziroj okaze de la jaraŝanĝigo, ni deziras al vi en la jaro 1953 feliĉon, prosperon kaj bonan kaj oftan Esperantoradioaŭskultadon. El supra listo malaperis Sofio, Stokholmo, Rabat kaj Bauru. Se vi ne sendos skribajn aplaŭdojn eĉ nur sur simpla poŝtkarto al la stacioj ankoraŭ dissendantaj Esperanton, ankaŭ ili ĉesigos siajn Esperantodissendojn. LA ESPERANTISTOJ HAVAS LA ESPERANTO-DISSENDONJN, KIUJN ILI MERITAS!!!!

Informojn pri Esperanto-radio-elsendoj sendu ne nur la radio-stacioj, sed ankaŭ la radio-aŭskultantoj al: S. S. de Jong Dzn, Radio-Servo N.C.K.E., Waltaweg 3, Tjerkwerd (Fr.), Nederlando.

la burgono



MONATA ORGANO
POR LA ASPIRANTAJ ANOJ



LA BREMENAJ URBMUZIKANTOJ.

Iam estis viro. Li havis azenon. La azeno portis sakojn al la muel-
ejo. Kiam la azeno estis maljuna, ĝi ne plu povis labori. Tial la sinjoro
volis mortigi ĝin. La azeno ne ŝatis tion kaj forkuris. Ĝi deziris iri
al Bremeno, la fama germana urbo. Ĝi volis tie esti urb-muzikanto.

Survoje al Bremeno la azeno renkontis hundon. La hundo estis tre
laca, ĝia lanĝo pendis el ĝia buŝo.

„Kial vi tiom malfacile spiras?” demandis la azeno.

„Ho ve!” respondis la hundo. „Mi estas jam maljuna kaj malforta
kaj ne plu povas labori. Mia sinjoro volis mortigi min kaj mi forkuris.”

La azeno bedaŭris la hundon kaj diris al ĝi:

„Venu kun mi. Mi iros al Bremeno por fariĝi urbmuzikanto. Mi
ludos la liuton kaj vi batos la tamburon.”

La hundo konsentis kaj ili iris nun duope al Bremeno.

Post mallonga marŝado ili renkontis katinon. Ĝi sidis ĉe la vojo
kaj estis tre malgaja.

„Kio malĝojigas vin?” demandis la azeno.

„Mi estas maljuna. Miaj dentoj ne plu estas akraj. Tial mi ne ŝatas
kapti musojn. Mi pli ŝatas sidi ĉe la varma fajro. Mia sinjorino volis
min ĵeti en la riveron. Mi volas ankoraŭ vivi kaj tial mi forkuris.”

„Ne plu estu malĝoja”, diris la azeno. „Venu kun ni. Ni iras al
Bremeno por fariĝi urbmuzikantoj. Ni bezonas vin.”

La katino forlasis sian sidlokon kaj ekiris kun la azeno kaj la hundo
al Bremeno.

La hundo, la azeno kaj la katiĝo marŝis, marŝadis. Ili preterpasis
farm-bienon. Sur la pordego de la farmbieno sidis koko. Ĝi kantis
laŭte kaj malgaje „kikeriki”. La koko fermis siajn okulojn. Ĝi ripozis
mallonge. Kaj poste ĝi denove kantis laŭte kaj malgaje: „Kikeriki”.

„Kio premas vin?” demandis ĝin la azeno.

„Morgaŭ estos multaj gastoj en nia domo”, respondis la koko
„Mia sinjorino volas kuiri bonan supon. Ŝi volas detranĉi mian kapon

kaj min uzi por la supo. Nun mi kikerikias tiel forte kaj tiom longe, kiom mi povas.”

„Ne estu malgaja” diris la azeno. „Venu kun ni. Ni iros al Bremeno, por tie fariĝi urbmuzikantoj. Vi havas belegan voĉon. Vi povos kanti. Kiam vi muzikos vespere, ĉiu homo ĝojos. Vi vidos.”

La koko diris jes kaj iris kun la azeno, la hundo kaj la katino al Bremeno.

(Daŭrigota en la aprila numero).

Mia kuniklo.

Antaŭ multe da jaroj mi posedis kuniklon. Tiu kuniklo estis blanka kun rozkoloraj okuloj. Ankaŭ flavan katon mi havis. La kuniklo kaj la kato estis grandaj amikoj kaj ĉiam manĝis kune.

Kiam la vetero estis varma, la kuniklo amis kuri en la ĝardeno por manĝi brasikojn. Iun tagon ni forgesis fermi la pordon de la kuniklejo. Ho ve! hundo eniris kaj mortigis mian kuniklon! Mi tre malĝojis kaj mi ploris multe. Multe!!

Mia patro diris komplate:


„Ne ploru mia knabineto, mi aĉetos por vi alian kuniklon.”

Tamen, mia patro tute forgesis la promeson kaj la kuniklejo restis malplena. Neniam mi ricevis alian kuniklon por ami.

Nun mi estas maljuna kaj mi tute ne deziras kuniklon. Ne, mi amas hundon nuntempe. Mi ne amas la hundon kiu mortigis mian kuniklon, sed mi amas mian hundon, kiu havas longan voston kaj longajn orelojn.

S-ino Salway.

En la nederlandaj lernejoj la infanoj ne lernas Esperanton.




La kliŝon afable disponigis „Het Vrije Volk”, Amsterdam, Nederlando.

INVITO
al la 9-a
INTERNACIA KONGRESO DE T.E.J.O.
3.8-10.8 1953

WÖRGL

TIROLO



- WÖRGL! Magia vorto por tiuj, kiuj jam vizitis ĝin;
..... idilia loko por pasigi interesplenan ferion;
..... bonegaj ekskurseblecoj al proksimaj lagoj, arbaroj kaj
montegoj.
- WÖRGL! Urbo kun moderne ekipitaj gastejoj kaj banejoj;
..... grava krucpunkto de fervojaj linioj Vieno-Parizo, Berlino-
Romo;
..... gastama urbo kun malnovaj Tirolaj kutimoj.
- WÖRGL! Konata al ĉiu Esperantisto pro ĝia Zamenhofa Monumento.
Jen nur kelkaj interesajoj pri nia ĉijara kongresurbo.
El la tre varia programo ni ĉerpas:
- EKSKURSOJ! al la ŝlimbordbanejo en Kirchbichl; al Vorder-
kaiserfelden aŭ Kaiserlifto; al Innsbruck per
pendfervojo; al Hechtsee.
- FESTVESPEROJ! grandstila Tirola vespero; internacia festvespero;
internacia balo.
- KUNVENOJ! florkronmetado ĉe Zamenhofa Monumento; jar-
kunveno; paroladkonkursoj.
- KOSTOJ:**
- | | |
|-------------------------------------|-----------------------|
| Kongreskotizo: por T.E.J.O.-membroj | 20 ŝilingoj |
| por ne-T.E.J.O.-membroj | 25 ŝilingoj |
| Ekskursoj: | (entute) 100 ŝilingoj |
| Restadkostoj: manĝoj kaj tranoktado | 39-54 ŝil. potage |
| unutaga pensio | 45 ŝilingoj |

9-a INTERNACIA KONGRESO DE T.E.J.O.

Wörgl/Tirol, 3.8-10.8 1953

Adreso:

L.O.K., Augasse 42, Wörgl
Tirol, Aŭstrio

ALIGILO

Mi aliĝas al la 9-a Kongreso de T.E.J.O. en Wörgl, samtempe pagante
Ŝ. 20/25 al suprenomita adreso/mia nacia peranto.

Bonvolu skribi preslitere!

1. Familia nomo: S-ro, S-ino, F-ino:
2. Antaŭnomo:
3. Naskiĝdato:
4. Nacieco/lando:
5. Adreso:
6. Profesio:
7. (Nur por eksterlandanoj) N-ro de la pasporto:
8. Ĉu T.E.J.O.-membro?
9. Mi verŝajne povos kontribui al la vesperaj programoj kaj prezentos:
.....
.....
daŭro ĉk minutoj.
10. Mi petas helpon de miaj geamikoj. Mi povas pagi nur %
(ne malpli ol 70 %) de la kostoj.
11. Mi donacas al la kongresa kaso.
12. Mi samtempe pagas kongreskotizo
.....
.....
donaco
13. **Mi intencas tendumi kaj kunportos propran tendon.**
Mi intencas loĝi en gastejo aŭ privata ĉambro.
Mi intencas loĝi en pensiono.

Dato

subskribo

N.B. Trastreku tion, kion vi ne deziras. 1, 2, 5 en nacia lingvo. 3, 4, 6, 8, 9 en Esperanto.